## 85-a SAT KONGRESO - 11a-18a Aŭgusto 2012
## JALTO - Ukrajnio

Jalto estas ĉefa urbo de suda bordo de duoninsulo Krimeo, aŭtonoma respubliko de Ukrainio.
De nordo ĝin ŝirmas kontraŭ ventoj montoj, de sudo varme karesas Nigra Maro. Ĝi estas la plej granda kaj prestiĝa ripozurbo de Ukrainio, centro de perklimata kuracado

Krimeo estas vera histori-arkeologia konservejo. Grekoj kaj romanoj, gunoj kaj bizantianoj, genuezanoj kaj turkoj alvenadis kaj lasis tiun ĉi teron. Kontraŭ ili batalis taŭroj, skifoj, slavoj.

Jalto estas unu el luliloj de la tutmonda E-movado. En 2012 okazos 120-jara jubileo de esperanto en Jalto. Tie ĉi loĝis famaj E-pioniroj d-ro I.Ostrovskij, N.Borovko, A.Ĉajkovskaj. En la centro de la urbo estas du memortabuloj omaĝe al ili.

La kongreso okazos en ripozejo je nomo de Anton Ĉeĥov – fama rusa verkisto, kiu fondis ĝin,loĝante en Jalto.
La kongresanoj loĝos en aparta ejo, kaj se necesos, aldonaj ĉambroj en najbaraj ejoj.

Loĝado en 2-litaj ĉambroj kun oportunaĵoj (necesejo, duŝejo, malvarmigilo), 3-foja manĝado kaj kuracado kostas ĉ. 30 eurojn. Estas ankaŭ ĉambroj kun oportunaĵoj en koridoro je malpli granda kosto.

En la ripozejo estas kurac-diagnoza centro pri nespecifaj malsanoj de pulmoj, kormalsanoj, pereferia nerva sistemo.

Turismo inkluzivos (la plimulto de):
Ekskursoj al: Nikita botanika ĝardeno (fondita en 1812), Livadia palaco (eksa cara palaco, kie okazis la renkontiĝo de la prezidantoj kaj decido fondi UN), Palaco de grafo Voroncov en loketo Alupka, vilao kaj muzeo de Anton Ĉeĥov, Urbo-heroo Sebastopolo, kaj je la lasta sabato eble ekskurso al Partenit
- la programo (entute) estas ankloraŭ prilaborita.
Dum la postkongresaj tagoj oni planas: ekskursoj al BaĥĈisaraj (iama Ĉefurbo de krimetatara ĥano) kaj Balaklavo, kaj mara promenado per velboato.
**Notu ke unu-du ekskursoj verŝajne okazos la lastan sabaton**

Fakte la ekskursoj komenciĝas jam ekde veturo de stacidomo en ĉefurbo Simferopolo al Jalto. La tutan vojon (80 km) eblas veturi per trolejbuso
Okazos ankaŭ: turistaj marŝoj al montaro, kaj arta programo de la jaltanoj:
Spektakloj de jalta E-teatro "Improvizo"
Koncerto de fama kantisto Pavel Moĵajev

**Bonvenon al senviza Ukrainio!**

***<u>85th SAT Congress 2012</u>*** *See footnote on page 17.*



**Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio**

# La Verda Proleto

**Journal of Workers' Esperanto Movement (SATEB)**

Numero 435 ~~~ Septembro 2011

## SAT - Celoj kaj Strukturo

SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) estas la plej grava tutmonda organizaĵo de laboristaj Esperantistoj. Ĝi celas faciligi la translingvajn kaj transnaciajn rilatojn inter tiuj homoj, kiuj luktas por mondo sen ekspluatado.

SAT celas faciligi rektajn kontaktojn inter membroj; krei fortikan senton de homeca solidaro; kaj helpi al lernado, instruado, kaj klerigado.

SAT kuraĝigas la kreadon kaj evoluon de racie pensantaj spiritoj kapablaj: ĝuste kompreni; ĝuste prijuĝi (ekz. rilate proprajn dogmojn); kaj krei bonajn tiel nomatajn "internaciistojn"

SAT celas ke la homaro atingu altan ŝtupon de civilizo kaj kulturo kaj celas helpi al ne-esperantistaj organizaĵoj, kongruaj al ĝiaj celoj, komuniki translingve. Resume el la statuto:

> "SAT celas helpi al progresemuloj tra la mondo: interkompreniĝi, informiĝi, kleriĝi, plibonigi la vivon, interrilati por agadi kontraŭ subpremo ktp. SAT uzas racie elpensitan lingvon por atingi siajn celojn : ESPERANTO."

SAT havas maldekstran / laboristan bazon, ne parti-politikan. Ĝi estas komuna kampo en kio partoprenas homoj kun diversaj tendencoj. Ĝi estas "forumo" malferma al: socialistoj, komunistoj, sennaciistoj, liberpensuloj, ktp. El la statuto:

> "SAT, fondita en 1921, estas tutmonda laborista kaj ĝenerale maldekstrema asocio kun kleriga agado. Kiel tutmonda asocio kun individua membreco – kaj kun tiuj membraro kaj celdifino – ĝi estas unikaĵo. Ruĝaj fadenoj tiriĝantaj tra ĝia historio ekde 1921 estas laborista solidareco kaj memorganizita kleriga agado funkciantaj per senperaj baznivelaj kontaktoj."

La organiza karaktero de SAT estas inter-individua, ĝia strukturo ne respegulas naciajn dividojn, tiel "sennacieca". Tio ne signifas ke ajna SAT-ano estas kontra naciismo. El la statuto:

(daŭrigo p. 6)

***SAT - Aims and Structure***

*- an English version appears on page 5*

# * S.A.T.E.B *

## WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT


Prezidanto / *Chairperson* Ed Robertson 52 Easter Drylaw View, Edinburgh EH4 2QP
Tel: 0131 3329808 <ed-robertson@teleosvet.co.uk>

Sekretario / *Secretary*: David Kelso - Vidu paĝoj 4, 8 kaj 9
- *See pages 4, 8 and 9*

Kasisto / *Treasurer* Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex
CM13 1EJ Tel: 01277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk>

**La Verda Proleto** Redaktoro / *Editor* Laura Miller, 68 Etherly Rd, LONDON N15 3AL
Tel: 020 8800 5120 <lauramiller1216@hotmail.com>


**Pri la enhavo de kontribuaĵoj respondecas nur la aŭtoroj mem.**
***Views expressed by contributors are the responsibility of the authors alone***

**KOTIZOJ / *SUBSCRIPTIONS***

**La SATEB-kotizo por 2011 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.** (formularo je paĝo 15)
***The SATEB subscription for 2011 was due in January.***
***If you haven't yet paid please do so now***
Detaloj kaj formularo je paĝo 15 / *Details and form on page 15*

**La SAT-kotizo por 2011 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.** (formularo je paĝo 16)

**La SAT-kotizo por 2012 pagendis en januaro**
**Bonvolu pagi akurate** (Detaloj kaj formularo je paĝo 16)**.**

**DANKON -** Ni daŭre dankas al Paul Gubbins pro lia zorga kontrolado de LVP.
***THANK-YOU*** - *We are always thankful to Paul Gubbins for his conscientious checking of LVP*

**LVP 435** Kontribuaĵoj invitataj - limdato 31-an de decembro 2011
*Contributions are invited - to reach us by 31st December 2011*



## *Declaration of the 84th SAT Congress - 2011*

*The 84th Congress of Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), gathering in Sarajevo from the 30th July to the 6th of August 2011, emphasises that its statute encourages members to be active in various fields. This year the theme of the congress was "Globalism and national phenomena".*

*The Congress,*

- *supports, in accordance with the work of the Sarajevo Esperantists, the proposal, that the Council of Europe declare Sarajevo, severely attacked during the Bosnian War but which nonetheless continues to be successfully multicultural, to be a European Metropolis of Culture at some time in a future,*
- *sends its condolences over the heartrending events of Oslo, Norway, and draws attention to the terrible consequences of all forms of terrorism, has written to the ambassadors of China, Pakistan, Russia, and the USA in Bosnia-Herzegovina to demand that the governments of those countries sign and ratify the Ottawa Convention, which bans all anti-personnel mines, and the Oslo Convention which bans any cluster munitions,*
- *has written to the president of the European Commission to request him to get hisstaff to look into the possibility of increasing the financial support to Bosnia-and-Herzegovina so that it can achieve the complete clearance of mines from its territory in 2019,*
- *notes that the difficulties regularly faced by people, caused by nationalism and capitalism, including ecological, domestic and economic conditions, are getting worse,*
- *notes that the people who for these reasons have to suffer the consequences of the theft of their land or of war nowhere become acceptable immigrants,*
- *notes the danger of the increase in gases that help global warming,*
- *notes that the political and financial powers do not sufficiently consider the adverse effects of ecological damage,*
- *warns of the dangers relating to dealing with nuclear energy, which cause catastrophes which affect the whole world such as in Chernobyl 25 years ago, and in Fukushima this year,*
- *opposes the initiatives by some governments to block public campaigning by suppressing activists, such as the Serbian government, that has restarted its unfounded prosecution of anarchists in Belgrade with the aim of separating them from the working class.*

## Deklaracio de la 84-a Kongreso de SAT - 2011

La 84-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunvenanta en Sarajevo de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2011, substrekas, ke ĝia statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj. Ĉi-jare, la kongresa temo estis "Tutmondiĝo kaj naciaj fenomenoj".

La Kongreso

- subtenas, akorde kun la agaddirekto de la sarajevaj esperantistoj, la proponon, ke la Eŭropa Konsilio proklamu Sarajevon, severe agresitan dum la bosnia milito kaj tamen plu sukcese multkulturan, eŭropa metropolo de kulturo en unu el la venontaj jaroj,
- kondolencas pro la korŝiraj okazintaĵoj de Oslo, Norvegio, kaj atentas pri la teruraj sekvoj de ĉia terorismo, skribis al la ambasadoroj de Ĉinio, Pakistano, Rusio, Usono en Bosnio-kaj-Hercegovino por postuli ke la registaro de tiuj landoj subskribu kaj ratifu la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas ĉiujn kontraŭpersonajn minojn, kaj la Konvencion de Oslo, kiu malpermesas iujn pafaĵoĵetojn el bomboj,
- skribis al la prezidanto de Eŭropa Komisiono por peti, ke li intervenu ĉe sia oficistaro por esplori la eblecon pligrandigi la monhelpon al Bosnio-kaj-Hercegovino por ke ĝi povu atingi la tutan senminigon de sia teritorio en 2019,
- konstatas ke pligraviĝas la malfacilaĵoj kiuj rezultas de naciismo kaj kapitalismo interalie ekologiaj, vivkondiĉaj kaj ekonomiaj kiujn regule frontas homoj,
- konstatas ke homoj kiuj devas pro tiaj kaŭzoj suferi la sekvon de la rabado de sia lando aŭ de milito fariĝas nenie dezirataj migrantoj, konstatas danĝeron de la kresko de gasoj kiuj elvokas tutplanedan varmiĝon,
- konstatas ke la politikaj kaj financaj fortoj ne sufiĉe atentas la malbonajn konsekvencojn de la ekologiaj damaĝoj,
- atentigas pri danĝero de pritrakto de nukleenergio, kiu okazigas katastrofojn tuŝantajn la tutan mondon kiel antaŭ 25 jaroj en Ĉernobilo kaj ĉi-jare en Fukuŝimo,
- kontraŭas la iniciaton de registaroj bari la vojon al sociaj luktoj per subpremo de aktivuloj kiel interalie la serba registaro, kiu rekomencas sian senbazan proceson kontraŭ anarĥiistoj en Beogrado kun la celo apartigi ilin de la laborista klaso.



## SATEB-JARKUNVENO 2011 / *AGM 2011*

La jarkunsido de SATEB okazos je 14.00h, la 22-an de oktobro, ĉe:
*The SATEB AGM will be held at 2.00 pm, 22 October, at:*

**Wedgwood Memorial College**
Station Rd Barlaston Stoke-on-Trent ST12 9DG

## TAGORDO / *AGENDA*

1. **Enkonduko / *Introduction***
2. **Pardonpetoj / *Apologies***
3. **Protokolo de la pasinta jarkunsido / *Minutes of the previous AGM***
4. **Raporto de la komitato / *Committee report***
5. **Kasraporto / *Treasurer's report***
6. **Membraro / *Membership***
7. **La Verda Proleto**
8. **SAT**
9. **Estonteco de SATEB (sube) / *Future of SATEB (below)***
10. **Baloto / *Elections***
11. **Aliaj aferoj / *AOB***

La kunveno okazos en Esperanto / *The meeting will be in Esperanto*

La kunsido okazos kadre de semajnfina "Diskutrondo" (Drondo) sed ĉiuj membroj rajtas veni nur por la jarkunveno. Se vi volos manĝi aŭ tranokti ĉe la altlernejo Wedgwood, necesas aranĝi tion tra Esperanto-Domo (vidu sube). Se vi ne jam aliĝis, kaj aliĝilo por Drondo ne troviĝas kun LVP, bv peti de Esperanto-Domo (sube). Se, pro spacomanko en la altlernejo Wedgwood, necesos loĝi ekstere je pli alta kosto (kun simila komforto), SATEB pretas pagi la diferencon.

*The AGM will take place as part of a Discussion Weekend* (Drondo) *but members are entitled to come for the AGM only. If you do come only for the AGM, but want to have a meal, or stay overnight, please contact Esperanto House (see below). If you haven't already enrolled for Drondo and there isn't a leaflet/application form with this LVP, please contact Esperanto House. If, through lack of space in the college, you have to stay outside at greater cost (for similar facilities), SATEB is prepared to pay the difference.*

**EAB** (Viv O'Dunne, Administrator)
Esperanto House, Station Rd, **Barlaston**, Stoke-on-Trent ST12 9DE.
tel.: 0845 230 1887 eab@esperanto-gb.org

## [La Redaktoro pri David Kelso]

Bedaŭrinde (pro teĥnikaj kialoj) la esperantanta versio de la suba teksto ne atingis la kompostitson antaŭ la momento kiam necesis sendi La Verda Proleto al la presisto.

Ni pardonpetas.

*Infortunately (for technical reasons) the Esperanto version of the article below didn't reach the compositor before the time that La Verda Proleto had to be sent to the printer.*

*We apologise.*

## *The Editor on David Kelso*

*David was my rock in Esperantujo. Have a problem with translation? Email David. Not sure if a piece was going to be received well? Talk to David. What about a particular point of view? Speak to David. How do we get things done more quickly? Get ideas from David. People not handing in items they have promised? David will be the heavy.*

*In the months since he disappeared, I have found myself missing his guidance and wry wit. He was a larger than life personality – no one who knew him can forget this love of good wine, his jokes (both in English and Esperanto), his long stories about life in general. When it was time to be serious, his opinions were firm and clearly put, his chairing was decisive and, as they say, he didn't take prisoners.*

*We didn't always agree; we argued and bickered. But I was in awe of his personal strength and thoughtfulness and in doing the Editor's work, he was my guru. In putting together LVP I have found myself wanting to consult him over and over again in the past few months – one of the reasons this LVP is so late.*

*We all feel dreadful for his family and for his other many friends. And his loss to Esperantujo is crucial – how many of us are at the same time writer, a speaker, a person who thinks as well as a person of action? We don't have enough people with all of these qualities. It is a tragedy not to have David with us.*

*Laura Miller*



## 84-a Kongreso de SAT - 2011 - Gvidrezolucio

La 84-a Kongreso de SAT kunvenanta en Sarajevo inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 2011,

- instigas la SAT-anojn raporti pri okazaĵoj en sia regiono kiel faris SAT-ano el Japanio pri la katastrofo en Fukuŝimo,
- plu instigas la membrojn al jarkomenca pago de la kotizo kaj al plej efika varbado de novaj membroj,
- invitas la Plenum-Komitaton organizi malfermitan konkurson por krei novajn varbilojn kiuj plej taŭge prezentu SAT kaj ĝiajn celojn,
- instigas ĉiujn SAT-anojn organizi SAT-kunvenojn dum ĉiuj landaj, regionaj aŭ fakaj kongresoj en kiuj ili partoprenos,
- instigas ellabori tekston por respondi en la retejo al la plej oftaj demandoj pri kio estas SAT, ĝiaj celoj kaj agadoj,
- bonvenigas la proponon krei artan fakon por efikigi la jam komencitan laboron de nunaj muzikistaj kaj artemaj SAT-anoj,
- refoje konstatas la efikan laboron de la Eldona Fako Kooperativa notinde pri la nun preskaŭ preta dokumentfilmo titolita Esperanto, plu instigas SAT-anojn mem partopreni en ĝia vivigo. Ĉiu SAT-rondo klopodu organizi minimume unu publikan projekciadon de la filmo, kaj laŭeble helpu la projekton per antaŭmendoj ĝis ĝia definitiva apero DVD-forme (espereble jarfine),
- proponas ke ĉiujare parto de la profito de SAT estu dediĉota al eldonoj per aparta kontero « Eldona Fonduso », provizore per EFK,
- invitas ĉiujn kamaradojn pli kontribui al Sennaciulo kaj al Sennacieca Revuo,
- plu instigas la kamaradojn kontribui al la SAT-retejo per sendado de materialo al ĝia respondeculo,
- invitas la Plenum-Komitaton daŭrigi kunlaboron kun IFEF,
- petas la Plenum-Komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso la materialaj kongreskondiĉoj estu SAT-ecaj kaj la turismaĵoj klerigaj.

### ***85th SAT Congress 2012 (back page)***

*These congresses are one of SAT's main activities, combining AGM activites with plenty of opportunities to hear about and discuss progressive issues and with some tourism as well. The participants will come from many different parts of the world, so the programme will be in Esperanto only, the working language of SAT. Also the volunteer organisers can only deal with their local language and Esperanto. For practical reasons, a sufficient knowledge of Esperanto is required by all those not accompanied by an Esperantist.*

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

Tutmonda forumoj, rektaj kontaktoj - per tiuj SAT celas antaŭenigi informadon kaj interkomprenon inter laboristoj kaj progresemuloj, por helpi forigi maljustecon ktp.
SAT uzas la racie elpensitan lingvon **- Esperanto -** por atingi siajn celojn.
*Worldwide forums, direct contacts - by these S.A.T. aims to promote knowledge and understanding amongst workers and progressives to help overcome injustice etc. - using the rational language* ***Esperanto*** *to achieve its aims.*

La demokrata strukturo de SAT estas inter-membra, ne inter-'nacia'.
*SAT's democratic structure is based on members, not on national boundaries.*
*Note that the worldwide nature of SAT means that only Esperantists may join.*

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" (literatura revuo) aperas jare. Adresaro (regule ĝisdatigita) ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj. SAT eldonas librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭnecese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

**Membro-kotizo: £45**. Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron, kaj rajtas pagi rabatan kongres-kotizojn.
(Minimume £23 por tiuj kiuj vere ne kapablas pagi la plenan kotizon)
**Dumviva membreco** nun havebla **- £1125 -** rabato ne haveblas.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £50. Sendu monon (se en britaj pundoj) al la peranto, ne al SAT.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: <satesperanto@free.fr> TTTpaĝo:<http://www.sat-esperanto.org>

**Uzu la suban formularon por informpetoj kaj pagoj por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ (Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***Sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT-Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ____________________

Nomo ____________________________________________

Adreso ____________________________________________

____________________________________________

(nedevigaj)-> tel: ____________________________________

retadreso: ____________________________________

☐ Marku, se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £_______+ donacon*£________sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (ĉekoj al "SAT.")

*celo por donaco___________________________________



## *SAT - Aims and Structure* [1]

*SAT is the most important worldwide association for worker Esperantists. It aims to help in inter-lingual and inter-national relations between those striving for a world free of exploitation.*

*SAT aims to make it easy to have direct contacts between members, aims for the creation of a strong sense of human solidarity, and helps its members to learn and get information and culture.*

*SAT encourages the creation and progression of rationally thinking spirits capable of: properly understanding, properly judging (e.g. about their own dogmas), and becoming good so-called "internationalists".*

*SAT wants the human race to reach a high level of civilisation and culture, and aims to help non-Esperanto organisations, compatible with its aims, in cross-language communications. To summarise, from its statute:*

> *"SAT aims to help progressives throughout the world: understand each other, keep informed, get educated, improve their lives, work together to act against suppression etc. SAT uses a rationally thought-out language to achieve its aims : ESPERANTO"*

*SAT is left wing / worker based, not party-political. It forms a common meeting ground for people of different persuasions. It's a "forum" open to socialists, communists, non-nationalists, free-thinkers, etc.*

*(There follows an extract from SAT's statute in the Esperanto version.)*

*Organisationally, SAT is based on individuals, its structure doesn't reflect national boundaries, hence non-nationalistic ("sennacieca"). This doesn't mean that any SAT member is an anti-nationalist. The extract from the statute in the Esperanto version adds that this arrangement is one step above "Internationalism", and emphasises that it is the basis for the name "Sennacieca Asocio Tutmonda" – Non-nationalistic Worldwide Association.*

*(continued on page 7)*

~~~~~

## **Ĉerpaĵo el la per-reta SAT-diskuto** - Pri la lasta SAT-kongreso

Okazis tri prlegoj ĉi-posttagmeze kaj vespere ni havis viziton de la urbestro kiu regalis nin per fruktosuko (ramadano malpermesis alkoholon). Mi havis belan interŝanĝon de dankoj inter la urbestro kaj mi. Poste ni ĝuegis vesperon internacian, en kiu nia Masakato prezentis kelkajn trukojn por porti varojn kiam mankas al vi mansako aŭ valizo. Kreita ĥoro kantis por ni diversajn kantojn kaj fini donis eblon al Lino regali nin per siaj artaĵoj.

Jakvo
~~~~~

## SAT - Celoj kaj Strukturo (daŭrigo)

> "Pro sia inter-individua karaktero kaj malhavo de strukturo respegulanta la naciajn dividojn en la mondo, SAT karakterizas sin kiel "sennaciecan", kaj superas per tiu kvalito je unu ŝtupo la "internaciismon". Tiu fakto klarigas ĝian nomon: Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)."

Ĉiuj membroj estas egalaj. Por praktikaj kialoj ekzistas Plenum-Komitaton (PK) kies rolo estas laŭeble plenumi la dezirojn de la membroj, inkluzive la traktadon de ĉiu-taga administrado. Ĝi ne regas aŭ diktas. Tiaj bezonoj de la membroj devas tamen esti praktikaj kaj laŭstatutaj. La indikoj de tiuj deziroj venas per rezolucioj, referendumoj, kongresaj diskutoj, opinioj esprimataj en aliaj okazoj, ktp.

Ekzistas ankaŭ Ĝenerala Konsilantaro (ĜK) kiu superrigardas la agadon de la PK, kaj konsilas al ĝi. Ĝi inkluzivas reprezentantojn de la membroj, de fakoj, de frakcioj kaj de ligitaj organizaĵoj.

Eksteraj organizaĵoj ofte inkluzivas individuoj kiuj interesiĝus pri SAT, povus profiti de helpo de SAT, aŭ utile kunlabori. La lokaj Laboristaj Esperantistaj Asocioj (kiel SATEB) plenumas parton de la rolo kontakti/varbi ilin, sed tio ankaŭ estas la rolo de SAT frakcioj kiel: Pacista, Liberpensula, Liberecana, Komunista, Ekologiisma, por Distribua Ekonomio, Sennaciisma kaj Ĉielarka (samseksemula). SAT ankaŭ havas fakojn: Junulfako, kaj Poresperanta.

Grava parto de la klerigado estas la rektaj kontaktoj inter membroj. Tiucele estas adresaro, kaj la devo ke membro respondu akcepteblajn informpetojn (detalaj kondiĉoj troviĝas en la statuto). Tiuj kontaktoj eblas per rektaj mesaĝoj, dum renkontiĝoj kongresaj (kaj alilokaj), kaj per la interreta SAT-diskuto.

SAT celas interalie informi per Sennaciulo (ĝiaj artikoloj kaj diskutoj), la SAT retpaĝoj, dumkongresaj eventoj, ktp.

SAT eldonas literaturaĵon kiuj rilatas al ĝiaj celoj, ekzemple en Sennacieca Revuo, en Plene Ilustrita Vortaro (PIV), libroj, kaj per ĝia Eldon-kooperativo.

SAT okazigas kongreson ĉiujare diversloke. Tiuj inkluzivas laborkunsidojn, administradon, informadon, gvidon, forumojn / diskutojn, fakkunsidojn, prelegojn, kulturon, distraĵojn, turismon, solenaĵojn kaj kompreneble individuajn interŝanĝojn dum paŭzoj. Kutime kongresoj produktas deklaracion por la ĝenerala publiko, kaj gvidrezolucion por la PK, kaj la membraro.

Arturo Prent



# SATEB

### *WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT*

Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio celas "diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T."
- celas venigi Esperanton al ĉiuj progresemaj organizoj.
*SATEB - aims "to make known and teach the international language Esperanto, and promote the ideas of SAT."*
*- aims to bring Esperanto to the notice of all progressive organisations.*

Por informo pri SAT bonvolu vidi la venontan paĝon.
*For information about S.A.T. please see the next page.*

SATEB estas sendependa de SAT, sed aktive subtenas ĝin per disvastigo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro, kaj per organizado de kunvenoj ĉiujaraj.
SATEB *is independent of S.A.T., but actively supports it by spreading information about its principles and work, and by organising yearly meetings.*

**Por pli da informo** bonvolu sendi la suban formularon al la sekretario:
***For further information*** *please send the form below to the secretary:*
David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
aŭ **retu** al / *or* ***email*** *to*: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Membrokotizo, inkluzive / *Membership, including* : 'La Verda Proleto': £7.00
(tiuj kun malaltaj enspezoj -minimume / *those with low incomes -min.*: £3.00)
(Abono nur por / *Subscription only for* : 'La Verda Proleto': £5.00)

Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p. 2)
*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p. 2)*

*cut >* - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - *< tranĉu*

☐ *Information request* Informpeto ☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon ☐ *Renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ______________________________

*Address* ______________________________

/ Adreso ______________________________

(*optional* / } *Phone* / Telefono ______________________________

nedeviga )} *email* / retpoŝto ______________________________

*You may send my details to other Esperanto organisations* ☐
Vi rajtas sendi miajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

*I enclose* / : } *membership* / kotizon £________ *donation* £________
Mi kunsendas } *subscription* / abonon / donacon

*Date* / dato____________________ *Total* / Sumo: £__________

*cheque/PO/other* ______________ ĉeko/poŝtmandato/alia______________

*cheques etc. payable to* / ĉekoj ktp. pagendaj al "SATEB"

**LabourStart** **(http://www.labourstart.org/eo/)**

Kie sindikatanoj komencas sian tagon sur la reto **Tutmondaj sindikataj novaĵoj**

La sindikata ttt-paĝaro prizorgata de Eric Lee daŭre funkcias, sed la esperanta parto lamas. Sube, raporto de Paul Hewitt, parto de raporto de la SAT PK al la membroj. Plej sube, (ripete) la plej lastan artikolon.

### Multlingva sindikata novaĵretejo LabourStart

**Post la morto de Alwyn Kind, mankas kompetenta tradukisto.** Paul faras kio eblas, sed se vi opinias, ke vi povos helpi, aŭ konas iun, kiu eble povos, bonvolu kontakti: **Paul Hewitt kv9999e50ster@googlemail.com**. Se ne estas granda risko, ke Labourstart ne plu havos Esperantajn paĝojn.

Intertempe, ni tre dankas al Paul Hewitt pro liaj ĝisnunaj laboroj.

Sube la lasta artikolo kiu aperis - ke estis antaŭ preskaŭ jaro substrekas la mankon de homforto

### Belgio Strikoj fermas fervojajn ligojn

Lundon 18 Oktobron 2010.

Fervojaj laboristoj en Belgio fermis preskaŭ la tutan nacian fervojaron kaj interrompis internaciajn servojn hodiaŭ proteste kontraŭ reformoj kiuj povus kosti centojn da laborpostenoj. La striko estis organizita de la Socialisma laborsindikato CGSP/ACOD proteste kontraŭ la kondiĉoj de novaj "flekseblaj" kontraktoj. La estroj de la entrepreno SNCB volas enkonduki la ŝanĝojn sen diskutado kun la sindikatoj kaj laboristoj.

La laborsindikatoj avertis, ke la kontraktoj plifaciligus la maldungadon de centoj de laboristoj.

La striko koincidis kun la grandegaj protestoj en najbara Francio. La strikoj en ambaŭ landoj blokis reltransportadon tra vasta parto de Okcidenta Eŭropo kaj kripligis la Eurostar de Londono al Bruselo kaj la Thalys vojo de Parizo al Kolonjo.

Eurostar ankaŭ nuligis ĉiujn trajnojn al Bruselo kaj ofertis aŭtobusservon por konekti la Belgan ĉefurbon al Lille en Francio. La strikoj ankaŭ kaŭzis gravajn problemojn sur la vojsistemo. Oni raportis, ke ĝis meztago 350 mejloj de ŝtopiĝoj troviĝis tra la lando.

*(Labourstart is a web site for trade union news. It has reports in Esperanto as well as many other languages.)*



## *SAT - Aims and Structure* (continued)

*All members are equal. For practical reasons there's an implementation committee (PK) tasked to carry out the wishes of the members, including dealing with day-to-day administration. It doesn't rule or dictate. The members' requirements none-the-less need to be practical and in accordance with the statutes. Indications of these wishes come from resolutions, referendums, discussions during congresses, views expressed on other occasions, etc. There is also a general council (ĜK) that overlooks the work of the PK and advises it. It includes representatives of the members, of factions, of sub-groups, and of related organisations.*

*Outside organisations often have members who would be interested in SAT, could use SAT's help, or could usefully collaborate. Local Workers' Esperanto Associations (such as SATEB) fill part of the role of contacting/recruiting them, but this is also the task of SAT sub-groups such as: Pacifist, Free-thinking, Freedom, Communist, Ecological, for Distributed Economy, non-nationalist, and Rainbow (homosexual / lesbian). SAT also has factions: Youth, and "for-Esperanto".*

*An important aspect of education and informing are the direct contacts between members. For this there is an address list, and the requirement on members to answer acceptable information requests (exact conditions are in the statute). These contacts can be made by direct messages, when meeting during congresses (and elsewhere), and through the on-line discussion group "SAT-diskuto".*

*Among the means SAT uses to inform its members are articles and discussions in its magazine "Sennaciulo", its website, events during congresses, etc.*

*SAT publishes literature relating to its aims, e.g. in its literary review "Sennacieca Revuo", in its Esperanto-Esperanto dictionary PIV, as books, and as booklets through its publishing co-operative (Eldon-kooperativo).*

*SAT has a congress every year in various places. These incorporate working meetings, administration, information, guidance, forums / discussions, lectures, cultural events, entertainment, tourism, formal occasions and, of course, individual exchanges of information during any free time. A congress usually produces a declaration for the general public, and a guidance resolution for the committee and membership.*

*Arturo Prent*

## David Kelso

Nia kamarado David Kelso, tiam sekretario de SATEB kaj de Esperanto-Asocio de Britio, kaj membro de la redakcia komitato de Sennaciulo, raportiĝis mankanta en novembro de 2010 de sia dumvintra hejmo en Kalabrio, suda Italio. Najbaroj en lia vilaĝo, San Pantaleo di San Lorenzo, vidis lin la antaŭan tagon, ekpromenantan en la belegan apudan pejzaĵon kiun li bone konis kaj amis. Grandaj serĉadoj entrepreniĝis de teamoj de karabinieroj kaj aliaj italaj instancoj kaj volontuloj, kun helpo de helikopteroj, kaj unuoj de flarhundoj kaj specialaj montarsavistoj de aliaj partoj de Italio dum pli ol semajno, sed finfine senrezulte. David, emeritiĝinta inspektoro de supera edukado en Skotlando, estis bone konata ne nur en Britio sed en aliaj partoj de Esperantio. Li aktivis en la esperanto-movado ekde junaĝo, kaj en lastaj jaroj vigle partoprenis en SAT. Niaj pensoj estas kun liaj familio kaj proksimuloj. Ni esperas kompreneble pri feliĉa konkludo al ĉi tiu malfeliĉa sagao, kvankam kun la paso de tempo, tio fariĝis malpli verŝajna. Tro frue estas por nekrologo, sed mi certas tamen, ke mi eĥas la sentojn de multaj, kiam mi diras ĉi tie, ke li vere estis bonkora, inteligenta, sprita persono kiu buntigis mian vivon, kaj li ege mankas al mi

Ed Robertson

\~~~~~

## Ĉerpaĵoj el la per-reta SAT-diskuto -Rigoreco

En tuta Eŭropo furoras nun politikoj de drasta ekonomia rigoreco sub la premo de tutmondaj merkataj instancoj: IMF, bankoj, ktp.

Rimarkindas, ke ekonomia rigoreco neniam signifas rigorecon por ĉiuj, sed ĉiam rigorecon por la plej malriĉaj aŭ mezaj sociaj tavoloj (klasoj), favore al la plej riĉaj. Tiuj politikoj ne nur estas maljustaj, sed ili ankaŭ pligravigas la enprofundiĝon en la problemojn,kiujn ili pretendas mildigi.

Petro Levy

La politikojn faras la registaroj demokratie elektitaj.
La mezaj kaj malriĉaj socitavoloj ankaŭ elektis burĝajn partiojn.
Tial ekzistas la rigoreco .

Dieter Rooke
(daŭrigo p. 9)

Ĉi tiu ĉerpaĵo estas ekzemplo de la enhavo de la SAT-diskuto.(kun gramatikaj korektoj). Anoj de SAT povas vidi la tutan gamon. Por aliĝi al SAT, vidu p. 16.



## *"Side by side we battle onward"* (continued)

*For the first time in decades, there is solidarity peeping out from amongst working people and for trade unions – and this in a country where trade union membership is down to some say as low as 7%. As the deputy director for one of the largest municipal workers' union said in a stirring speech in Chicago, "Whether you are a member of the labor union or not, we are all members of the labor movement now." Workers in many states are beginning to realise that they must "Hold the Fort." If these bills go through, the ensuing struggle may take the country back to the 1880's, when the fight for trade unionism first began in earnest in the US.*

*And don't think it couldn't happen here. In my recent visit to the States, I saw some scary similarities between the Teapartyites and the Tories. Private health system? Check. Private enterprise taking over schools? Check. Forcing people off disability and onto work search lists for jobs that don't exist? Check. Trying to force pensions private and lower? Check. (And thanks to Billy Bragg who pointed out in a session of "Any Questions" that the reason the government wants pensions to be as low as possible is because this will encourage private enterprise to take over.)*

*Maybe unions are next. After all, even the Teapartyites weren't stupid enough to put all their ideas in their manifestoes.*

*But there is some good news – many of those Teapartyites are now having to wait for "recall"votes – with enough signatures, an elected politician can be forced into another election. Not all demonstrations are loud – but some can be very effective*

*Laura Miller*

\~~~~~

## *What Zamenhof said about workers*

*"Probably for nobody in the world has our democratic language more importance than for workers and I hope that sooner or later they will become the strongest support of our cause. Not only do the workers understand the utility of Esperanto, but they more than others feel the essence and ideas of Esperantism."*

.

## **Flanko ĉe flanko, ni batalas antaŭen!** (daŭrigo)

La unuan fojon en jardekoj, ekestas solidaro inter laboristoj kaj por sindikatoj – kaj tio estas en lando, kie la proporcio de laboristoj, kiuj membras en sindikatoj, estas (iuj diras) tiom malalta kiom sep elcentoj. Kiel diris la vicestro de unu el al plej grandaj el la sindikatoj por municipaj dungitoj, en ekscita parolado en Ĉikago, "Ĉu vi membras en sindikato aŭ ne, ni ĉiuj membras en la labormovado nun." Laboristoj en multaj ŝtatoj komencas kompreni, ke ili devas "teni la fuorton[2]". Se ĉi tiuj leĝoprojektoj estos plenumitaj, la sekva lukto eble rekondukos la landon al la 1880-aj jaroj, kiam la lukto por sindikatoj en Usono serioze komenciĝis.

Kaj ne supozu, ke ĝi ne povus okazi ĉi tie. Dum mia lastatempa vizito al Usono, mi vidis timigajn similecojn inter la Tepartianoj kaj la Konservativoj. Ĉu privata sansistemo? Marku. Ĉu privataj entreprenoj kaptu lernejojn? Marku. Ĉu movi personojn el la nelaborpova listo kaj en listoj de postenserĉuloj por postenoj, kiuj ne ekzistas? Marku. Ĉu peni privatigi pensiojn kaj malgrandigi ilin? Marku. (Kaj dankon al Billy Bragg, kiu atentigis, en la televida programero "Any Questions", ke la kialo, kial la registaro deziras kiom elbe malgrandigi pensiojn, estas ke tio helpos, ke privataj entreprenoj kaptu ilin.)

Eble la sekvaj viktimoj estos la sindikatoj. Malgraŭ ĉio, eĉ la Tepartianoj ne estis tiom stultaj, ke ili anoncis ĉiujn siajn ideojn en siaj manifestoj.

Sed iom da bona novaĵo ekzistas: multaj el tiuj Tepartianoj nun devas atendi "revokajn" voĉdonadojn. Per sufiĉaj subskribintoj, oni povas imponi rean voĉdonadon sur elektita politikisto. Ne ĉiuj manifestacioj estas laŭtaj - sed iuj povas esti tre efikaj.

Laura Miller

2 Ĉi tio referencas la saman kanton kiel noto 1.

~~~~~

## **Vortoj de Zamenhof pri laboristoj**

" Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, - ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo.

12

## ***David Kelso***

*Our comrade David Kelso, then secretary of SATEB and of the Esperanto Association of Britain, and member of the editorial committee of Sennaciulo, was reported missing from his winter home in Calabria, southern Italy in November 2010. Neighbours in his village, San Pantaleo di San Lorenzo, had seen him the previous day, setting off for a walk in the beautiful nearby countryside, which he knew well and loved. Large scale searches were carried out by teams of carabinieri and other Italian forces and volunteers with the help of helicopters and units of sniffer dogs and mountain rescue specialists from other parts of Italy for more than a week, but without any success in the end.*

*David, a retired inspector of higher education in Scotland, was well known, not only in Britain, but elsewhere in the Esperanto-speaking community generally. He had been active in the Esperanto movement from a young age and in recent years had been very active in SAT. Our thoughts are with his family and those close to him.*

*We hope, of course, for a happy conclusion to this unhappy saga, although, with the passage of time, that has become less and less likely. It is too early for an obituary, but I am certain that I echo the thoughts of many, when I say that he certainly was a kind, intelligent, lively person who brightened up my life, and I really miss him.*

*Ed Robertson*

~~~~~

## **Ĉerpaĵoj el la per-reta SAT-diskuto** -Rigoreco (daŭrigo)

"La politikojn faras la registaroj demokratie elektitaj.
La mezaj kaj malriĉaj socitavoloj ankaŭ elektis burĝajn partiojn."

Tio estas konstato.

bresler lucien

Tiu rimarko estas tiagrade ĝusta, ke ĝi estas praktike aplikebla al ĉiu ajn okazaĵo. Ekzemple, Hitler estis "demokrate" elektita, do la amasmurdo de la kapteblaj judoj estis demokrata faro, lastanalize kun la subteno de la judoj mem, ktp. Ni povas eĉ rimarki, ke la tero turniĝas kun nia "demokrata" konsento: konkrete, ni nenion faras por kontraŭstari.

Petro Levy

(la diskuto daŭrigis)

*A sample from the SAT email discussion group: - about economic stringency. The group is open to SAT members, and is in Esperanto - the language of SAT*

## Flanko ĉe flanko, ni batalas antaŭen![1]

Britio ne estas la sola lando, en kiu publikservaj dungitoj suferas nuntempe, kvankam la brita gazetaro preskaŭ tute ne rimarkas la kontraŭbatalon.

Pli kaj pli da usonaj ŝtatoj, komence Viskonsino, kie oni elektis membrojn de la "Tea Party" (Tepartio) kiel ŝtatestrojn, proponas leĝprojektojn kiuj, se oni leĝigos ilin, proskribos kolektivan marĉandadon por ĉiuj publikservaj dungitoj. Tio finus sindikatecon por publikservaj dungitoj en Ohio, Majno kaj Viskonsino – kio estas ekstrema ironio, pro tio, ke Viskonsino estis la unua ŝtato, kiu permesis kolektivan marĉandadon.

Kontraŭlaboristaraj fortoj nun sentas, ke ili posedas sufiĉe da povo por detrui, senpune, la rajtojn de laboristoj – rajtojn, kiujn laboristoj gajnis dum multaj jardekoj kun akompanantaj perforto kaj murdo.

Lastjare, Demokrataj ŝtataj leĝofaristoj en Viskonsino, profitante de malofteuzata jura ruzo, transloĝiĝis en Ilinojson bloke. Ili supozis, ke neniu voĉdonado eblos en Viskonsino, ĉar mankos kvorumo. Bedaŭrinde, la ŝtata senato do forigis la kolektivan marchandadan parton de la leĝprojekto el la tuta leĝprojekto, kiu temis pri mono. La nova leĝprojekto pri kolektiva marĉandado ne bezonis kvorumon, ĉar ĝi ne temis pri mono; do oni leĝigis ĝin.

Individuoj de ĉiuj partoj de la ŝtato (centmil en februaro) kolektiĝis en la ŝtata kapitolo en Madisono por protesti kontraŭ ĉu tiu maljusta leĝoprojekto.. Multaj "faris kiel en Egipto" – dormis ekstere en glacia vetero en Madisono, en tendoj kaj dormosakoj, gajnante forton de sia organizaĵo kaj de tiuj de aliaj ŝtatoj. En multaj aliaj ŝtataj ĉefurboj, laboristoj solidariĝas por Viskonsino.

Ohio pretiĝas por leĝigi alian, pli drakonan leĝprojekton, kiu permesus iun instancon trudi pagtarifojn kaj laborkondiĉojn al iuj publikservaj laboristoj – policistoj, fajrestingistoj, instruistoj – je iu ajn tempo. La ŝtatestro de Majno deziras forigi leĝaron, kiu limigas kiom da tempo infano estas permesata labori dum lerneja trimestro.

(daŭrigo p. 12)

1 La titolo referencas usonan laboristan klasbatalkanton.

∼∼∼∼∼

**Bv. Noti:** La du versioj de tekstoj ne nepre estas rektaj tradukoj unu de la alia. Aŭtoroj eble verkas ambaŭ sendepende, ofte pli natura fluo estas preferinda, kaj ofte ne ekzistas precize ekvivalentaj vortoj en la alia lingvo.



## *"Side by side we battle onward"*

*Britain is not the only country in which public employees are having a hard time, although the fight back has been virtually unnoticed by the British press.*

*An increasing number of states, beginning in Wisconsin, where Tea Partyites have been elected to State Governorships are putting forward bills which, if enacted, would outlaw collective bargaining for all public workers. This would be the end of unionism for public employees in Ohio, Maine and Wisconsin – an extreme irony, since Wisconsin was the first state to allow collective bargaining.*

*Anti-labour forces now feel they have the power to destroy with impunity the rights of workers, rights won over many decades with accompanying anti-union violence and murder.*

*Last year, Democratic state lawmakers in Wisconsin, taking advantage of a seldom used legal loophole, moved into Illinois en bloc. They thought that no vote could then be taken in Wisconsin, as there would be no quorum. Unfortunately, the state senate then removed the collective bargaining part of the bill from the bill as a whole, which was about money. The new bill on collective bargaining didn't need a quorum, because it wasn't about money, so it was passed.*

*Individuals from all over the State, 100,000 in February, gathered in the state capitol in Madison to protest this iniquitous bill. Many were "doing an Egypt" - sleeping out in freezing weather in Madison in tents and sleeping bags, gathering momentum from other states' and their own organisation. In many other state capitols, workers are rallying for Wisconsin.*

*Ohio is getting ready to pass another, more draconian bill, which would allow any authority to impose pay and conditions on any public servants – police, firemen, teachers etc at any time. The governor in Maine wants to get rid of legislation that limits the amount of time a child can work during school terms.*

*(continued on page 13)*

∼∼∼∼∼

***Please Note:*** *This, and other English versions of texts are not necessarily exact translations of the Esperanto (or vice-versa). Authors might create the two versions separately, or the translations might provide a more natural flow. Sometimes there are no exact equivalent words, as is often the case with any two different languages.*